

# La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

*Espéranto : vers une culture  
sociale sans frontières.*



*Fine...*



*... ni kongresis!*





# El la kongreso



Oficiala akcepto ĉe la urbo-domo



Oficiala akcepto ĉe la urbo-domo

Tri el la ses kandidatoj al komitato



Dum prelego pri Eŭropo

El la filmo de FR3



Vin-gustumado



Sabata vespero : «Les minorettes»



Lunda vespero : Ĵak LePuil Serĝo Sir'

## en SanSebo...



# Ĉu ni, denove sur firmaj reloj?

Okazis kongreso. Ne giganta, tamen okazis. Kandidatiĝis kandidatoj por komitato. Ne amase, tamen pli ol fingroj de unu mano. Pligrasiĝis kontrol-teamo por La Sago. Ne ĝis obezeco, tamen kun ano, kun la nepra rolo de kunordiganto.

Ja la rezolucio (vidu p. 4) invitas la komitaton organizi tujan referendumon por elekti la novajn komitatanojn, kaj ankaŭ por decidi pri ŝanĝoj aŭ ne de la statuto.

Dum la debatoj, neniam oni aludis pri la bezono «tuj-tuji» tiun referendumon. Ja okaze de la voĉdono tiu «tuj» estis aprobata, sed iom ŝtelkaŝe...

Kutime, la referendumo okazas novembre por elekti la komitatojn laŭ la civila jaro. Tio ne okazis en 2015 (sen referendumo), nek en 2016 (junie).

Pro la sekvaj motivoj ni decidis ne tro prokrasti ĝin, ĉar la prezidanto/kasisto anoncis sian demision ĉisomere kaj la komitato tiel estos nur unukapa. Tamen ne indas tro urĝiĝi:

- ĉar necesus publikigi la statuton modifitan far la kongresanoj, kaj jam tro da surfaco uziĝis pro tio, kaj urĝas aperigi LaSagon ne sinke subfalante sub administraj zorgoj.

- ĉar necesas tempo por plej taŭge redakti la referendumilon: ĝi ja ne nur entenu simplajn voĉdonojn per «Jes» «Ne» «Sindetenon» al la kandidatoj, al la modifoj de statuto, kaj al la prunt-aĉeto de akcioj «B» de Greziljono (vidu plu p.4), sed ankaŭ enketon pri help-preteco, kaj plie ĉi jare, enketon pli detala rilate la revuon kaj kiel oni legas (aŭ ne legas) ĝin.

Dum la kongreso, oni petis kandidatiĝojn, kaj pro la ega bezono, oni ne ludis la «delikatan buŝon» (Fr: «la fine bouche») kaj ne petis ke la nov-kandidatoj sin prezentu, kune kun la motivoj por tion fari.

Ĉar ili ne estas tute nekonataj en niaj medioj, mi ja povas iom prezenti ilin (laŭ alfabeto ordo):

- **Elizabet' Barbay** kiu jam de longe aktivas en la SAT-amikara sidejo, tamen sen aliĝi al la asocio (pro nepripensoj?) kaj ankaŭ en Kulturdomo Greziljono kies membro SATam estas.

- **Lucette Échappé «Lumeto»** kiu havas la kvalitojn de siaj malvirtoj, multe da energio kvankam iom pelmela, sed al kiu ni tamen ŝuldu la resurreligitan kongreson!

- **Petro Levy**. Piliero de SAT, sperta esperanto-parolanto, tre funde subtenanto de SAT-amikaro, li decidis dediĉi grandan parton de siaj fortoj ne nur al la komitato, sed plie al la kontrolo de La Sago.

- **Ansofi Markov**, filino de la ĉi supra, (sed tio estas nur anekdota) kiu multe baraktis dum la kongreso por ke oni ne forgesu Kvinpetalon, la alia kulturcentro. Ankaŭ ŝi ja multe deziras ke SAT-Amikaro ne pereu.

- **Serĝo Sir'**, do mi mem, konscia pri siaj malvirtoj, ĉefe pri sia malkapableco en diplomateco, tamen preta dediĉi multe da tempo kaj energio favore al la asocio.

-**Solange Van Landeghem** (al kiu la alfabeto ordo malebligis al mi esti galanta) estas certe la malpli konata el la kandidataro pro sia diskreteco. Tamen ŝi partoprenis preskaŭ ĉiujn lastatempajn SAT-Amikarajn kongresojn, kaj eĉ komencis organizi kongreson en Bourges en 2012, kiu lastmomente fiaskis pro neatenditajoj, kaj kiu fine okazis en Ĉatoruso.

Rilate la statuton, la ŝanĝoj estas sufiĉe detalaj krom en la punkto 9 pri la komitato. Ĝi estas legebla p. 4.

Serĝo Sir'

<b>SAT-Amikaro</b>	
«Ĉu ni, denove sur firmaj reloj?»	3
Ni kondolencas	9
<b>El la SAT-Amikara kongreso</b>	
Kovrilpaĝo: Ni kongresis	1
Fotoj el la kongreso	2
Statuto-ŝanĝoj (ekstakto)	4
Raporto	4-5
Rezolucio	5
Laborhistoria kulturcentro	7
Finan ve(n)kon... veganismo	15
<b>Nia felietono Misŝuoj (13)</b>	12-13
<b>Ideoj / Rakontoj / Informoj</b>	
La malnova afero Sacco-Vanzetti	6-7
Ĉeĉeno Homĉasado...	13
Alvoko de la 22a de marto 1871...	13
<b>Pedagogio</b>	
Slipoj	9-10
<b>Libro-servo</b>	
utilaj informoj	8
	10
<b>Recenzoj</b>	
Libro vivas pli longe...	11
<b>Humuraĵoj-distraĵoj</b>	
Selle-Humuraĵo	4, 6
Tra la fenestro	9, 16
Vegane kuku	15-16
Te/st/udo §5	16
<b>Plu moviĝas la movado</b>	13, 15

## NIVELOJ


Ĉiuj artikoloj estas akompanataj de lingv-nivela simbolo:

K = Komencantoj

P = Progresantoj

S = Spertuloj

**kun asterisko** se tradukata franclingven aŭ kun glosaro por lingvaj malfacilaĵoj.



## LA SAGO.

CPPAP n° 0322 G 86224. ISSN : 1763-1319.

SAT-Amikaro, 132/134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris

Directeur de la Publication: Serge Sire

Impr. sur papier recyclé par:

L'arbre aux papiers 72100 Le Mans

Dépot légal à parution.

**Ĉefredaktanto kaj enpaĝiganto:** Serĝo Sir'.

**Redakt- kaj kontrol-skipo:** Janine kaj Yannick Dumoulin, Lucette Échappé, Luc Gouverneur, Ĵak LePuil, Petro Levi, Serĝo Sir'.

**Partoprenis en ĉi numero:** Rolando Cuenot, Lucette Échappé (Lumeto), Veronik' Girard, P. Grolemond', Izabel LamiRested', Mikael Leibman, Guy Martin, Ĵak LePuil, Vinko Markovo, Vito Markovo, Jean Selle, Serĝo Sir', Bernhard Tuidier, Juliette Ternan.

## Kontribuajoj Contributions

**Ĉiam bonvenaj!** Sendu ilin al la redakta korespondanto:

**Toujours bienvenues!** A – faire parvenir au correspondant de rédaction:

Reto: [lasago@free.fr](mailto:lasago@free.fr)

■ Prefere per reto, **tekstoj** en RTF-, ODT-aŭ TXT-formo por ligitaj dosieroj, skribitaj prefere en Unikodo, **bildoj** en TIFF-, JPEG-, PCX- aŭ GIF-formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj **prefere** tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) Ne tajpitaj kontribuajoj publikigeblas nur se volontulas iu tajpanto.

■ Artikoloj ricevitaj post la 20a de la paraj monatoj ne povas esperi aperigon en la tuj sekvonta numero.

■ *de préférence par internet, textes en format RTF, ODT ou TXT pour un document joint, et images en format TIFF, JPEG, PCX ou GIF.*

■ *éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (erreurs éventuelles notées en marge) Les articles manuscrits ne peuvent être publiés que si nous disposons de dactylos bénévoles.*

■ *Les articles reçus après le 20 des mois pairs ne peuvent pas espérer être publiés dans le numéro immédiatement suivant.*

**Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto**



# Tra la fenestro

Dzeka, marto 2017

Saluton al ĉiuj,  
 Printempas, najtingalo kantas kaj prefere al ridi, mi, havas koron por plori...  
 Ve, oni vivas maltrankviligan epokon. Oni ne plu pripensas, oni reagas... kaj se eblas tuj ekstare. Fido (en Dio, en dogmo aŭ en nacio) venkas prudenton. Kaj fido, kiel kolero povas esti terure malbona konsilanto. Enmemiĝo tendencas, humanismo forpartigiĝas al sektoro de ekskutimaj, eksteruzaj ideoj.  
 Eĉ ĉi-tie, en mia montrofenestro, mi aŭdis paroli pri umo kiu «surpuge faligis min», se vi bonvolas pardoni min pro tiu esprimo, kiun mia avino ne aprobis. Imagu ke esperantisto skribis esperante en esperanta ĵurnalo mirigantan artikolon indan je la plej malbona nazia propagando, amasigante mensogojn kaj historiajn malveraĵojn, publike mallaŭdegante tutan popolon, entute denoncigitan kiel kulpan pri faktoj, krome malekzaktaj. (Malgrandan parentezon: Ĉu tenti iun al rasa hato ne sankciiĝas en nia lando?)  
 Naive, mi pensis ke «Zaza» kreis Esperanton por faligi landlimojn inter lingvoj kaj popoloj, por ke oni interparolu anstataŭ interinsulti aŭ interbati. Vekiĝu ni! Indignu ni!  
 Bone, mi emas fini tiun kronikon kun frazo de S. Zweig, trovita en ties libro publikigita en 1935 (!) pri Erasmo. (Ankoraŭ humanisto, idealisto pri kiu oni devus paroli en tiu epoko dum kiu oni festas Luteron): «Ĉiam necesos tiuj, kiuj montras al popoloj tion, kio repacigas ilin preter tio, kion ilin mal-konsentigas kaj kiuj renovigas en homaj koroj kredon en pli alta humaneco.»  
 Ĉu ne vere, samideanoj?




Ĝis,  
 Dzeka

K\*

Lingva helpkadro p.9

transsendis Izabel' LamiRested'.



\*Testudo = tortue / Test-studio = étude par tests.  
 \* Bredi = élever (faire l'élevage). Pour "élever ses

enfants, ses petits", on dira plutôt "eduki"...  
 Kian pedagogion havas nia hom-testudo?